Heinrich Heine,

# Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab' ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)*

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.*

Heinrich Heine,

# En Majo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor' estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,

# En la mirida bela Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor' la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
dum birda tril' ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Kálmán Kalocsay *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)*

Heinrich Heine,

# En dolĉega Maj'

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj',
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj',
Dum birda kanto sonis,
De l' kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`.